

# NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1<sup>a</sup> dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: [esperantobi.tk](http://esperantobi.tk)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

**Jar-kotizoj:** Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**JANUARO/FEBRUARO 2012**

**Nro. 90 (1/12)**



Parto el la partoprenantoj en la Z-festo de la 17-a de decembro 2011

## Denove ni ne sukcesis en la kristnaska loterio.



Unu jaron plian, ni devis rezigni pri riĉiĝo pere de la kristnaska loterio tial ke la konvena mano de sorto ne tuŝis nin.

Tamen, ni devas danki al ĉiuj, kiuj helpis en la disvendado de biletoj kaj al tiuj, kiuj aĉetis ilin, tre speciale al tiuj kiuj mendis biletojn, pere de interreto, el lokoj tre malproksimaj de Bilbao.

Koran dankon al ĉiuj kaj ... ĝis la venonta kristnasko.

## Subvencioj pro la instalota lifto.

Rilate monon, bonaj novaĵoj alvenis, danke al demarŝoj de niaj estraranoj: “Fundación Esperanto” decidis alporti subvencio de 800 eŭroj, kiu trafis nian konton jam en decembro.

“Surbisa”, publika entrepreno por renovigo de la malnova kvartalo de Bilbao, decidis helpi per subvencio de 908,80 eŭroj, kiujn ni ricevos kiam la lifto estos jam instalita.

Dume, la laboroj daŭrigas kaj, laŭ onidiroj de la najbaroj, la lifto ekfunkcios laŭlonge de februaro.

## CUOTAS DEL AÑO 2012.

Un nuevo año ha comenzado y, con él, nuestra petición, a todos los socios, de que el pago de la cuota anual se haga a la mayor brevedad posible. Las cuotas vigentes, que permanecen inalteradas un año más, son las siguientes:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.  
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.  
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

La cuenta del Grupo, en la BBK: 2095-0141-41-2218001550

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## Propagandi pri Esperanto per ironio.

La E-klubo de la inĝeniera atlelejo de Gijón (Ĥiñón) propagandas jene pri Esperanto:



Ĝi tekstas: “Ne lernu Esperanton. Kiu ajn lingvo aspektos poste ege tediga”.  
(Iciar Artech. 01/02/2012)

## KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

5/8 apr. 2012. Iberia Renkontiĝo, kune organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, kastelurbeto Sezimbro (Sesimbra).

27 apr./ 1 maj. 2012. 71-a Hispana Kongreso. Almagro (Ciudad Real).

16/20 julio 2012. 9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Galivo, Irlando.

28 jul/4 aŭg. 2012. 97-a Universala Kongreso en Hanojo.

5 - 12. Aŭg. 2012. 68-a Internacia Junulara Kongreso en Tenri, Japanio.

11 – 18 aŭg. 2012. Kongreso de SAT en Jalta, Ukrainio!  
rete: jefim\_z@mail.ru; skajpe terano37

18/25 aŭg. 2012. 79-a Itala E-Kongreso. Mazaradelvalo (Sicilio).

6 - 13 okt. 2012. 20a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Tarragona). Inf.: luis\_serrano@ya.com

julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando



## **La venonta Hispana Kongreso, en Almagro (C. Real).**

La estraro de HEF decidis akcepti la inviton de la Esperantista Kastili-Manĉa Asocio okazigi la 71-an Hispanan Kongreson de Esperanto en la urbo Almagro (provinco de Ciudad Real). La Kongreso disvolviĝos de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012 (profitante la kombinojn de festoj kiuj okazas dum tiuj tagoj), eventuale kun turisma postkongreso dum la 2-a de majo.

Ni certe profitos plurajn tre interesajn cirkonstancojn. Unue, ke Almagro estas konata kiel la ĉefurbo de la Teatro, danke al sia "corral de comedias". Ni ankaŭ troviĝas en la koro de la tero de Donkiĥoto. Pli proksime al Esperanto, venonta jaro estos la 20-a datreveno de la firmiĝo de la Ibera Skolo de esperantaj verkistoj, kaj ni esperas kalkuli je la ĉeesto de pluraj el ties anoj.

Fine, memoru ke dum venonta jaro ĉiuj esperantistoj festos la 125-an datrevenon de la naskiĝo de nia lingvo. Tio respeguliĝos en la kongreso, kiel grava parto de la projekto kiun HEF komencis prilabori por adekvate festi la datrevenon.

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 18/11/2011)*

## **Nova aspekto de la HEF-paĝaro.**

La paĝaro de HEF aperas kun nova aspekto: <http://www.esperanto.es/hef/index.php>

*(Darío Rodríguez. 26/11/2011)*

## **Omaĝo al la Internaciaj Brigadoj en la Kataluna Kongreso.**

Dum la 35a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazonta en Barcelono de la 28a ĝis la 31a Oktobro, oni efektivigos omaĝon al la Internaciaj Brigadoj kiuj batalis kontraŭ la frankisma ribelo je 1936. Jen la teksto aperanta en la Kongreslibro:

La Internaciaj Brigadoj estis trupoj de volontuloj venintaj el la tuta mondo por batali kontraŭ la faŝismo dum la hispana enlanda milito. Ili estis fonditaj en 1936 en Moskvo, kun rekrutcentro en Parizo, kaj batalis ĝis 1938, kiam ili estis malfonditaj. La brigadanoj venis el 54 diversaj landoj kaj plimulto el ili ne estis soldatoj sed junaj laboristoj idealismaj.

Multaj el la esperantistoj partoprenintaj en la Popolaj Olimpikaj ludoj en 1936, integriĝis en la respublika flanko kiam ekis la milito, tie estis la ĝermo de la klopodo krei batalionon de brigadanoj esperantistaj.

Kvankam ni ne tro certas pri la ekzisto de tiu bataliono, estas dokumentita la partopreno de pluraj esperantistoj inter la brigadanoj kaj la uzo de la internacia lingvo kiel interkomunikilo.

La plej konataj esperantistoj kiuj anis en la Internaciaj Brigadoj estis la germana verkisto Ludwig Renn, komandanto de la bataliono Thälmann kaj iniciatinto de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV); la aŭstro Franz Haiderer, kiu sendis artikolojn en Esperanto al Ĉeĥoslovakio, kie estis tradukitaj kaj

publikigitaj en la lokaj gazetoj. Similan agadon faris la polo Władysław Lekowski kaj la bulgaro Nikola Mladenov.

Estas dokumentita la uzado de Esperanto kiel skriba lingvo en la Internaciaj Brigadoj en diversaj dokumentoj kaj en la internacia korespondado, eĉ ekzistis cenzur-servo en la internacia lingvo.

Partoprenos en la omaĝo Gregor Benton, filo de Arthur Henry Benton, kiu venis al Barcelono en 1938 kiel brigadano. Antaŭ nelonge la Brita Nacia Arĥivo kompilis liston kie li aperas kune kun Eric Blair, reala nomo de George Orwell.

*(Darío Rodríguez. 21/10/2011)*

## **Eŭska vortaro kaj Vortaro De Diego.**

### **EŬSKA VORTARO**

Revizianta mian retpaĝon pri kursoj, vortaroj kaj aŭtomataj tradukiloj en iberiaj lingvoj ( <http://www.telefonica.net/web2/dariorls/kursoj.html> ) mi kontrolis la bonan funkciadon de la ligiloj al la eŭska-esperanta kaj al la esperanta-eŭska vortaroj <http://esperant0.chez-alice.fr/esperant64/euxskau0.htm> kaj <http://esperant0.chez-alice.fr/esperant64/esperu0.htm>

Indus speguli ĉi du vortarojn en aliaj retejoj por eviti ĝian eventualan malaperon el Interreto. Ĉu en la retejo de HEF ? Ĉu en alia ?

### **GRAN DICCIONARIO DE DIEGO**

Mi devis ŝanĝi la ligilon al Gran Diccionario de Fernando de Diego. Ĝi nun aperas en [http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com\\_wrapper&Itemid=154](http://www.esperanto.es/hef/index.php?option=com_wrapper&Itemid=154) sed perdiĝis la malnova rekta adreso <http://esperanto.es/diccionario/index.asp> .

Tamen Google proponas duan adreson kiu montras tre bone la vortaron:  
<http://helpo.esperanto.es/diccionario/index.asp>.

*(Darío Rodríguez. 09/11/2011)*

## **Aŭstrianoj en la hispana milito.**

Mi trovis imponan datumbazon pri la civitanoj el Aŭstrio kiuj batalis en la Internaciaj Brigadoj, dum la interna milito de Hispanio:

<http://www.doew.at/frames.php?/service/spanien/index.html>  
kun fotoj, biografioj, ktp. En almenaŭ du el ili aperas ke ili estis esperantistoj.

- Franz Haiderer [http://www.doew.at/frames.php?/service/spanien/h/haiderer\\_franz.html](http://www.doew.at/frames.php?/service/spanien/h/haiderer_franz.html)

Lia partopreno en la milito estas konata, ĉar li tion rakontis en artikoloj. Tre interesaj en tiu reto estas la fotoj, kaj ankaŭ diversaj leteroj al lia panjo. Mi malmulte komprenas la germanan, sed en la unua letero, se mi bone komprenas, li petas al la panjo la sendadon de vortaroj de Esperanto kaj adresaro de esperantistoj. (Ankaŭ aperas materialo pri la rusa, sed tiu paragrafo estas trastrekita; ĉu de la cenzuro?)

- Franz Jaritsch [http://www.doew.at/frames.php?/service/spanien/j/jaritsch\\_franz.html](http://www.doew.at/frames.php?/service/spanien/j/jaritsch_franz.html)

La foto de la homo apartenas al esperantista kunveno [Esperantistentreffen in der Disterwegschule in Linz, ca. 1930] Li mortis en koncentrejo Dachau. (Ankaŭ Haiderer estis en Dachau, sed li supervivis). Impresa dokumentaro, vere tranaviginda.

(*Toño del Barrio. 26/11/2011*)

## Prezentado de grava libro pri historio.

La Ministerio de Defendo, jes, la ministerio pri militaj aferoj, ĵus publikigis libron pri la militistoj, kiuj defendis la Respublikon dum la civila milito. Ĝi titoliĝas "25 militares de la República", kaj enhavas biografiojn de 25 plej gravaj militistaj gvidantoj.

[http://www.portalcultura.mde.es/publicaciones/publicaciones/Historia\\_Militar/publicacion\\_0223.html](http://www.portalcultura.mde.es/publicaciones/publicaciones/Historia_Militar/publicacion_0223.html)

Unu el la biografiitoj estas Julio Mangada, kaj la tekston verkis..., jes, mi mem. La ceterajn biografiojn verkis profesiaj historiistoj, kelkaj tre konataj (kaj mi esperas ke miaj mankoj ne tro elstaru). Fakte, vi povas vidi aludon al tio en artikolo en hodiaŭa El País:

[http://www.elpais.com/articulo/opinion/Dar/gato/liebre/elpepuopi/20111210elpepiopi\\_9/Tes](http://www.elpais.com/articulo/opinion/Dar/gato/liebre/elpepuopi/20111210elpepiopi_9/Tes)

Kompreneble, mi multe aludas la esperantistecon de Mangada, sed ne forgesas aliajn facetojn de lia vivo, kaj lia karaktero, liaj konfliktoj, kaj la publika bildo pri li.

(*Toño del Barrio. 10/12/2011*)

## Bitoteko en Hispana.

Nu, mi estas tre kontenta, ke finfine ni sukcesis eniri oficialajn instancojn. Ne malbele sidas Bitoteko en *Hispana*:

<http://hispana.mcu.es/es/estaticos/contenido.cmd?pagina=estaticos/presentacion>,

<http://hispana.mcu.es/es/comunidades/registro.cmd?id=1808>

*Hispana* estas projekto de la Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sporto de Hispanio celanta arigi la hispanajn bitokolektojn de arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj, inter kiuj elstaras la bitotekoj de hispanaj universitatoj kaj de la Aŭtonomaj Komunumoj. *Hispana* plenumas do, je nacia nivelo, la samajn funkciojn ol *Europeana*, kaj ĝi kolektadas ĝis nun la dokumentojn de 162 bitotekoj, inter kiuj la nia. Tio signifas pli da videbleco por ni ĝenerale, kaj la pli konkretajn avantaĝojn ke eblos aliri niajn dokumentojn rekte el la ministeria retejo kaj fari serĉon en ĉiuj kolektitaj bitotekoj samtempe.

Ni celas aperi la Bitotekon ankaŭ en *Europeana*, sed tio signifas pli da laboro, ĉar ni devas adapti kelkajn el la metadatenojn, kiujn ni uzas al la postuloj de **Europeana**. Kredeble la afero ne estos tre komplika, sed ni bezonos ankoraŭ iom da tempo. Baldaŭ aperos informeto prie en *Boletín* kaj nia paĝaro.

(*Ana Manero. 03/02/2012*)

## Zamenhof en la televidprogramo « Pasapalabra ».

En hodiaŭa televida kvizo "Pasapalabra", aperis la demando "Per la Zo, fondinto de la internacia lingvo Esperanto en 1887".

La konkursantino ne konis la respondon, kaj pro tio ŝi malvenkis, kaj estis eliminita.

(*02/02/2012*)

## **Película sudafricana rodada íntegramente en Esperanto, candidata al Oscar a la mejor película extranjera**

Ambientada en una África tribal, el director Ian Morgan hace esta película íntegramente en la lengua internacional esperanto creando su historia con actores que representan fielmente las sociedades tribales sudafricanas. Realizada por la AFDA (la escuela de cine y espectáculos en vivo de Sudáfrica) bajo la batuta de Ian Morgan, esta película que es candidata al Oscar a la mejor película extranjera.

<http://www.colifloresyesperanto.es/noticias-esperanto/pel%C3%ADcula-sudafricana-rodada-%C3%ADntegramente-en-esperanto-candidata-al-oscar-la-mejor>

## **UK en Argentino?**

Tri urboj el Argentino konkuras oficiale por esti la sidejo de la Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2014:

[http://www.turismo530.com/noticia\\_ampliada.php?id=26433](http://www.turismo530.com/noticia_ampliada.php?id=26433)

Argentina se postuló para ser sede del Congreso Universal de Esperanto 2014. Esta acción organizada por el INPROTUR contó con el apoyo los Organismos oficiales de Turismo y Convention & Visitors Bureau de Buenos Aires, Mar del Plata y Rosario.

A partir de las gestiones realizadas por el ministro de Turismo y presidente del Instituto Nacional de Promoción Turística (INPROTUR), Enrique Meyer, visitó nuestro país Clay Magalhaes, secretario permanente de Congresos de la Asociación Universal de Esperanto (UEA), quien realizó visitas técnicas en las ciudades de Buenos Aires, Mar del Plata y Rosario junto a representantes de INPROTUR y la presidenta de la Liga Argentina de Esperanto, Silvia Rottenberg, a fin de presentarle las variadas opciones que nuestro país ofrece para ser sede del congreso número 99 de la asociación internacional.

En abril de 2012 el Board de la Asociación Universal de Esperanto definirá que ciudad será la sede de la "99-a Universala Kongreso de Esperanto" en el año 2014. Las tres ciudades argentinas estarán compitiendo con la Ciudad de Sarajevo, capital de Bosnia y Herzegovina. El apoyo y acompañamiento brindado desde el INPROTUR forma parte de las acciones realizadas desde 2008 a través de la implementación del Plan de Marketing de Turismo de Reuniones, en busca de posicionar a nuestro país como uno de los principales destinos de eventos internacionales.

*(Darío Rodríguez. 01/01/2012)*

## **Denove la Papo salutis Esperante.**

Ĉi-jare denove salutis la Papo esperantlingve okaze de Kristnasko, laŭ informo de Carlo Sarandrea en SCE.

<http://www.ikue.org/>

<http://www.ikue.org/kristnasko2011/kristnasko2011.htm>

[http://www.ikue.org/kristnasko2011/bn\\_kristnasko2011.mp3](http://www.ikue.org/kristnasko2011/bn_kristnasko2011.mp3)

*( Darío Rodríguez. 25/12/2011)*

## Eo en la paĝo de la pola prezidanteco de EU-Konsilio.

Ĉi semestre Pollando havas la prezidantecon de la Konsilantaro de Eŭropa Unio. En la oficiala paĝo de tiu prezidanteco aperas hodiaŭ informo pri la 152a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. La paĝo nur legeblas france, angle, pole kaj germane. Jen la adreso de la zamenhofa paĝo en kiu la informo legeblas france kaj esperante:  
<http://pl2011.eu/fr/content/152eme-anniversaire-de-la-naissance-de-ludwik-zamenhof>

*(Darío Rodríguez. 15/12/2011)*

## E-kursoj en universitatoj.

Eblas konsulti la liston ĉe :

Edukado Net : - en la dosierujo : <http://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=183>  
- en la kursejoj : <http://edukado.net/kursejo>

*(Germain Pirlot. 11/01/2012)*

## Multlingva vortaro.

Troveblas en la reto nova vortaro multlingva. Ĝi inkludas tri iberiajn lingvojn, do, eblas traduki esperanten vortojn el la portugala, kataluna kaj hispana, kaj inverse. La kompleta listo de lingvoj estas:

Afrikanso, albana, araba, angla, angla (malnovangla), bulgara, ĉeĥa, dana, Esperanto, feroa, finna, franca, germana, hispana, kataluna, nederlanda, okcidentfrizona, papiamento, portugala, saterlanda frizona, taja kaj turka.

La adreso: <http://www.de.majstro.com/Web/Majstro/home.php?qebrTaal=epo>

*(Darío Rodríguez. 13/01/2012)*

## Google permesas traduki al kaj el Esperanto.

Hieraŭ Google aldonis Esperanton kiel tradukeblan lingvon al ilia [Google Translate](http://www.google.com).  
<http://googletranslate.blogspot.co.nz/2012/02/tutmonda-helplingvo-por-ciuji-homoj.html>

*(Raúl Salinas. 23/02/2012)*

## Zamenhof iĝis bjalistoka simbolo.

Zamenhof venkis en la voĉdonado por elekti simbolon bjalistokan. La teksto parolas de surprizo, ĉar [Palaco Branicki](http://www.palaco-branicki.pl) ekis kiel plej probabla venkonto. Fakte, ĝi havis grandan avantaĝon ĝis kiam kara Darío partoprenis (bjalistokanoj ne sufiĉe bone konas lin). Nu, mi ĝojas pri la venko de niaj majstroj :-)

Jen la pola teksto

[http://wiadomosci.onet.pl/regionalne/bialystok/wybraliscie-symbol-bialekostoku,1\\_5033231,region-wiadomosc.html](http://wiadomosci.onet.pl/regionalne/bialystok/wybraliscie-symbol-bialekostoku,1_5033231,region-wiadomosc.html)

Se vi ne scipovas la polan, vi povas esperantigi ĝin pere de la Guglo-tradukilo :-)

*(Javier Guerrero. 23/02/2012)*